

BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II.—SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».—Februaro 1913.—N^o 2 (8)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 ▪ Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Projekto de unugrupiĝo*, Raportisto. — *Vizito. Sciigoj. Ĉagreniga novaĝo*, Jozefo Grau.

PROJEKTO DE UNUGRUPUĜO

La 23^{an} de Januaro honorigis nian sidejon per sia ĉesto reprezentantoj de 12 grupoj barcelonaj, kiuj kunsidis laŭ la invito, kiun ni aperigis la pasintan monaton. Antaŭ ili kaj dudeko da personoj, kiujn interesis la anoncita kunsido, la komisiono prizorganta la projekton de regularo por la unuiĝo prezentis ĝin.

Komence Sro. Rey, prezidanto de «B. S.» cedis la prezidan lokon al Sro. Campdelacreu, prezidanto de *La Rondo*, kiun la ĉestantoj afable akceptis kiel sian prezidanton. Li tuj transdonis parolon al Sro. Grau, kiu longe raportis pri la projekto verkita de la membroj de *La Rondo*, *Ĉiam Antaŭen* kaj *Barcelona Stelo*. Li diris, ke la verkintoj ekzamenis la kaŭzojn malsukcesigintajn la provojn unuiĝi antaŭe faritajn kaj konsciinte ilin, provis ilin solvi por ne riski denove danĝeran pereon. Mi ne donos multajn detalojn el la prezentataj de Sro. Grau, ĉar oni povas ilin ŝanĝi, kaj estus senutile raporti pri ili. Mi nur diros, ke la projekto faris bonan impreson; ke oni ĝin presos kaj dissendos al ĉiuj barcelonaj grupoj kaj ke tiuj ĉi proponos ĉiujn modifojn, kiuj povas perfektigi la verkon.

Poste, laŭ propono de Sro. Pujulà, kiu reprezentis nian grupon, estis akceptata unuanime de la sinjoroj, kiujn mi citos poste, la sekvanta konkludo:

«La kunsidanta delegitaro vidas kun simpatio kaj entuziasmo la ideon de alproksimiĝo aŭ kunfandiĝo de la grupoj en Barcelono».

Alprenis tiun decidon Sroj. Bori, en reprezento de *Esperanta Aŭroro* (K. E. F.); Carmona, de *Paco kaj Amo*; Diaz, de *Esp. Racionala Grupo*, (K. E. F.); Anglés, en la nomo de *Ĉiam Antaŭen* (K. E. F.); Hil, en tiu de *La Rondo* (K. E. F.); Piñol, reprezentanto de *Supren!* (K. E. F.); Cruz, de *Esperanta Movado*; Agut delegito de *Esperanta Frateco* (K. E. F.); Llorach, de *Espero Kataluna*; Horta, en la nomo

de *Semo*, (K. E. F.); Pujulà reprezentanto de *Barcelona Stelo* (K. E. F.) kaj Blanch de *Esperanto kaj Patrujo* (K. E. F.). Kelkaj el tiuj sinjoroj sciigis, ke la signifo de iliaj voĉoj povos esti ŝanĝata de la decidoj de la grupoj respektivaj, kiuj rajtigis ilin kiel aŭskultantojn de la projekto; tamen ili diris, ke tio ne estas esperebla.

Aprobinte ke la sama komisiono daŭrigu laboradon pri la projekto prezentita, per kantado de «*La Espero*» oni finis la kunsidon.

RAPORTISTO

VIZITO

Nia holanda samideano Sro. H. P. Allaries, oficiro maŝinisto en la ŝipo «Jacob van Harkesk» restinta kelkajn tagojn en nia haveno, havis la afablecon viziti nin la 21^{an} de Januaro. Mi kore dankas lin por la honoro, kiun li faris al ni per sia vizito, kaj prezentas al li la sincerajn bondezirojn de niaj kungrupanoj.

SCIIGOJ

La Komitato de «B. S.» organizas vizitojn al la Fabrikoj de gazo kaj elektro kaj al la eksperimenta scienca kabineto «Mentora» en la Tibidabo. Ano de nia grupo faros en tiuj lokoj klarigajn paroladojn esperante.

— Ni sciigas al niaj kungrupanoj neofte vizitantaj la grupejon, ke la monkoklekto por la standardo de K. E. F. estos fermata baldaŭ. Poste oni ne plendul!

ĈAGRENIGA NOVAĴO

Nia samsocietano Sro. Amadeo Nebot ĵus mortis. En tiu malŝanĝo ni petas lian fraton kaj kungrupanon nian, Sron. Isidro, kaj ilian familion akcepti la sinceran kondolencon de BARCELONA STELO!

JOZEFO GRAU